


Numero: 316.
Septembro: 2018.

26-a jarkolekto

VESPERTO

Literaturaj folioj



Redaktanto
Apáti Kovács Béla
Kaposvár, Béla király u. 44. HU-7400
Telefona: 06/20/497-03-64
Retadreso: apatikb111@gmail.com
Eldonanto: KAPOŠVARA ESPERANTO-CENTRO
Lingve kontrolis: Erzsébet Tuboly

Aŭtuno

Lerni Esperanton

Baldaŭe la arboj kaj arbustoj vestas sin en koloraj vestoj. En la arbaroj la birdoj mutiĝas kaj nur frosta vento kuregadas inter la branĉoj.

Ni melankolie pensas pri la forpasinta somero, kiam la sunradioj varme karesadis nian korpon.

Nova sezono. Novaj taskoj. Ni esperas, ke Esperanto disvastiĝos tra la tuta mondo.

Belega revo kaj sonĝo, kiuj varmigas nian koron.

Ne sufiĉas nur paroli pri la zamenhofa lingvo. Ĉiutage ni devas agi, por ke ĝi atingu sian lokon inter la multnombraj naciaj lingvoj!

Oni diras, Esperanto estas senutila lingvo kaj ĝi jam neniu interesas. Ĝian rolon okupis la angla. Ja, jam ĉiuj homoj parolas ĝin kaj per la helpo de la angla lingvo ĉiuj komprenas unu la alian.

Esperanto ne deziras fariĝi la konkuranto de la naciaj lingvoj. Ĝi nur volas helpi en la internacia komunikado.

Kiom bonege estus, se ni homoj havus pontolingvon, per kiu ni povus kompreni nin ie ajn en la tuta mondo. Krome tiu ĉi lingvo estus facile ellernebla por ĉiu. Ne lastvice ĝi estus neŭtrala.

Fine denove estas aŭtuno kaj ni esperu, nia amata lingvo baldaŭe en la estonto fariĝos la dua lingvo de la homaro.

Vesperto jam travivis multe da aŭtunoj kaj mi tre esperas, ankoraŭ multe da jarojn ĝi ekaperos.

Estos grave, ke vi helpu min per viaj kontribuajtoj, sinceraj kritikoj.

Vole nevole sur la paĝoj estas ankaŭ lingvaj eraroj. Bonvolu ankaŭ ilin sciigi al mi!

Denove estas aŭtuno, sed nin ne malĝojigu la nebulaj tagoj. Eĉ kaptu la okazon, ni havos pli multe da tempo por Esperanto.

— Redaktanto —



Neniu pensu, ke sen lingvoscio oni povas ekzisti nuntempe. Oni devas lerni lingvojn.

Granda demando, kiun lingvon oni elektu el la pli ol 3000 ekzistantaj lingvoj?

Mi scias, estas lingvoj, kiujn parolas kaj uzas malmultaj homoj, kaj en ĉiu jaro formortas lingvoj. Tiuj ĉi lingvoj malaperas por ĉiam.

Fakte en la mondo estas ses aŭ ok lingvoj, per kiuj oni povas orientiĝi ie ajn sur la terglobo.

Onidire la angla okupas la unuan lokon en tiu ĉi konkurso. Estas kiuj jam antaŭdiras, sufiĉas ellerni la anglan kaj solviĝas niaj lingvaj problemoj. Per la angla lingvo oni povas kompreni sin ĉie.

Estus bone, se ĝi estus vera kaj ĉiuj loĝantoj de Tero parolus ĉi tiun lingvon.

Ankoraŭ centmiloj ne parolas kaj komprenas ĝin. Ĉefe en Azio, kie rapide kreskiĝas la nombro de la loĝantaro.

La homaro sufokiĝas en la maro de la lingvoj. Se baldaŭ oni ne trovos solvon, tiam la lingvoĥaoso estos pli granda kaj ĝi povos konduki al terura katastrofo.

La homaro nepre bezonas komunan, internacian helplingvon per kiu ĉiu egalrajte povos kompreni sin.

Kiun lingvon ni elektu? Ĉi lingvo devas esti neŭtrala, facile ellernebla, belsona ktp.

Mi scias, tio ĉi ne estas facila afero.

Dum la historio de la homaro estis multaj provadoj por krei tian lingvon.

Ĝis nun la plej vivkapabla estis Esperanto. Per ĝi oni povas komuniki grandioze. Tio ĉi jam milfoje pruviĝis en la pasintaj jardekoj.


Ekde 1887 Esperanto montris al ni, ke ĉiu, kiu ellernis ĝin, bonege povas uzi sur ĉiu tereno de la vivo.

Do, la tasko en la sekvaj jaroj instigi la homojn lerni Esperanton.

Ĉi tio estu nia tasko kaj ni konvinku niajn geamikojn, konatulojn, najbarojn, gekolegojn ktp.

Mi kredas kaj scias, lerni la zamenhofan lingvon indas.

— Ŝaŝa —



Klanjo ne povas nei

Klanjo estis bela, preskaŭ dudekjara knabino. Ŝi vivis en modesta, senkomforta loĝejo.

Ŝi ne laboris. Vere somere ŝi ricevis laboron, kiel purigistino ĉe la fervojstacidomo.

Sed ŝi apaneŭ pasigis tie tri aŭ kvar tagojn. La laboro ne plaĉis al ŝi.

Klanjo maldungigis sin. En iu mateno ŝi ne iris por labori kaj la ĉefo tuj telefonis al ŝi.

— Kio okazis al vi Klanjo? Hodiaŭ vi forgesis veni por labori.

Ĉe la alia fino de la linio Klanjo nur silentis. Ŝi diris nenion.

La ĉefo ripetis:

— Kio okazis Klanjo? Kial vi silentas?



La knabino ne respondis. La telefono estis muta. Ŝi ankoraŭ aŭdis, ke la ĉefo diris:

— Bone, fraŭlineto, morgaŭ vi jam ne devos labori. Via posteno estas ĉesigita ekde hodiaŭa tago.

La knabino unutone komprenis, ke morgaŭ ŝi jam ne devos labori. Ŝi denove estas senlaborulino.

Verdire ŝi ne deziris labori. Klanjo ĉiam revadis pri facila vivo.

Nur vivi en la granda mondo kaj ĝui la tagojn, kiel Dio kreis ĉion por ŝi.

Tage ŝi dormis kaj ripozis. Post la sunsubiro ŝi ellitiĝis, ŝi vestis sin kaj ŝi ekiris al la centro de la urbo.

La urbo havis unusolan noktan amuzejon. Ĝia nomo estis BLUA MUSO.

La kelnerojn surprizis ŝia neatendita alveno.

— Fraŭlino, ĉi loko por vi estas nepermesita. Bonvolu foriri! — diris ĝentile iu kelnero, kiam li ekvidis Klanjon. — Serĉu alian amuzejon!

— Kial? — ŝi demandis scivole. — Mi vidas, ene estas aliaj knabinoj.

— Ili ĉiuj havas parulon. Sola virino ne rajtas eniri. Ĉu vi komprenis?

Ŝi malgajiĝis kaj ŝi jam turnis sin por iri aliloken, kiam fremdulo paŝis al ŝi.

— Karulino, ĉu vi longe atendis min?

Klanjo surpriziĝis, ĉar ankoraŭ neniam ŝi vidis la viron. Li estis mezaĝa, iomete grizharara kaj muskola. Ŝi ĵetis rigardon al la viro kaj ŝi elbuŝigis:

— Jes. La kelneroj malpermesas eniri.

Tion ĉi aŭdante tiu kelnero, kiu forsendis antaŭ nelonge Klanjon, tuj rapidis kaj komencis klarigi la miskomprenon:



— Pardonon, sinjoro, mi ne sciis. Mi pensis, ke ŝi...

La viro interrompis lin:

— Vi pensu nenion. La knabino estas kun mi.

— Jes, mi komprenis. Bonan amuzon kaj fartu bone en la trinkejo BLUA MUSO!

Antaŭ ili tuj malfermiĝis larĝe la pordo kaj ili povis eniri.

La tutan nokton ili pasigis tie. Ili dancis multe kaj Klanjo trinkis eĉ drinkis la plej multekostajn drinkaĵojn. La fremda viro pagis ĉion. Li plenumis ŝiajn ĉiujn dezirojn.

Ili forlasis la noktan amuzejon mateniĝante. La kelneroj vidis nur tion, ke Klanjo enaŭtomobiliĝis la aŭton de la viro, kaj post kelkaj sekundoj ili forvaporigis ien.

Ĉiu supozis, ke ŝi estis veturigita al la hotelĉambro de la viro, kiu estis sur la monto.

Poste jam neniu vidis Klanjon. Arbaristo trovis ŝian kadavron malproksime de la hotelo en densa arbaro.

Ankaŭ la viro malaperis kun la aŭto. La polico longe serĉis lin, sed vane.

Klanjo estis entombigita silente kaj sen parencoj.

La tero falis sur la ĉerkon eĥante, kvazaŭ la vekro de Klanjo estus aŭdebla el la malproksimo.

— Apáti Kovács Béla —



Poezio

Kial legi poemojn kaj versojn? La respondo estas facila. Ĉar ili donas al mi plezuron. La bonegaj poemoj instruas nin kaj helpas elteni la malfacilaĵojn de la vivo.

La vivo ofte estas terura kaj ĝi ege malgajigas min. Sed bona poemo dolĉigas nian vivon.

Ne forpasu tagon sen la legado de poemoj. Do, legu ĉiutage kaj instigu ankaŭ viajn geamikojn!



Al la Fratoj

Forte ni staru, fratoj amataj,
por nia sankta afero!
Ni bataladu kune tenataj
per unu bela espero!

Regas ankoraŭ nokto sen luno,
la mondo dormas obstine,
sed jam leviĝos baldaŭ la suno,
por lumi, brili senfine.

Veku, ho veku, veku konstante,
ne timu ridon, insulton!
Voku, ho voku, ripetadante,
Ĝis vi atingos aŭskulton!

Dekon da fojoj vane perdiĝos
la voko via ridata, -
la dekunua alradikiĝos,
kaj kreskos frukto benata.

Tre malproksime ĉiuj ni staras
la unuj de la aliaj...
Kie vi estas, kion vi faras,
ho, karaj fratoj vi miaj?

Vi en la urbo, vi en urbeto,
en la malgranda vilaĝo,
ĉu ne forflugis kiel bloveto
la tuta via kuraĝo?

Ĉu vi sukcese en via loko

kondukas nian aferon,
aŭ eksilentis jam via voko,
vi lacaj perdis esperon?

Iras senhalte via laboro
honeste kaj esperante?
Brulas la flamo en via koro
neniam malfortiĝante?

Forte ni staru, brave laboru,
kuraĝe, ho nia rondo!
Nia afero kresku kaj floru
per ni en tuta la mondo!

Ni ĝin kondukos ne ripozante,
kaj nin laciĝos nenio;
ni ĝin traportos, sankte ĵurante,
tra l' tuta mondo de Dio!

Malfacileco, malrapideco
al ni la vojon ne baros.
Sen malhonora malkuraĝeco
ni kion povos, ni faros.

Staras ankoraŭ en la komenco
la celo en malproksimo, -
ni ĝin atingos per la potenco
de nia forta animo!

Ni ĝin atingos per la potenco
de nia sankta fervoro,
ni ĝin atingos per pacienco
kaj per sentima laboro.

Gloro la celo, sankta l' afero,
la venko - baldaŭ ĝi venos;
levos la kapon ni kun fiero,
la mondo ĝoje nin benos.

Tiam atendas nin rekompenco
la plej majesta kaj riĉa:
nia laboro kaj pacienco

L. L. Zamenhof



Por infanoj



Fabelo 2 /en daŭrigoj /

MIRA RENKONTIĜO

La tutan semajnon pluvis. Ĉiuj

senpacience atendis la sunan veteron.

-Laŭ la veterprognozisto morgaŭ estos bela suna vetero eĉ ĉi forta ventoblovado ĉesos. – diris patrino dum tagmanĝo.

-Fine ni povas organizi ekskurson! - diris patro laŭtvoĉe rigardante la ridon sur la lipoj de sia edzino.

-Jes, vere ni povos ion fari, fakte mi preparos ĉion por la ekskurso al la vilaĝo de viaj gepatroj. Ĉu ni vojaĝos trajne aŭ aŭte. –demandis la patrino la edzon.

Ŝi estis kontenta ĉar ili vizitos la avinon Mara, la patrinon de sia edzo. Ŝi estas babilema, sed ŝi tre amas la filon, Petron, ekpensis la edzino.

Laŭtvoĉe ŝi aldonis –Miaopinie estu bone por Petro vidi avinjon Mara kiu volonte montros al li kiel aspektas vilaĝana ĉiutageco.

Petro estis tre feliĉa ĉar li tre amis sian avinjon Mara sed ankaŭ li tre amis vojaĝi per trajno. En la vilaĝo loĝas multaj parencoj de la familio tute nekonataj al li. Ja mi havas nur kvar jarojn.

Ho, kia bela travivaĵo estas vojaĝi trajne. Li sidos ĉe la vagonfenestro rigardante kiel rapide forflugas belaj pejzaĝoj. Mi estas svingonta al la homoj starantaj sur la kajo.

-Ho, kiom mi estas feliĉa, panjo!

.... kiun tagon ni ekskursu? - demandis Petro la patrinon tre emociie.

Estis Sabato, la tago markita por ekskurso. Petro ellitiĝis frumatene. Jam manĝis la matenmanĝon kaj senpacienca atendas la patrinan alvokon por kune ekiri al la trajna stacidomo. La patro jam foriris por aĉeti biletojn

Subita sonorilado prenis lin el vojaĝa bonsoneco

- Kiu estas nun? La patro sed kial li sonorigas, ja li havas domŝlosilon - diris la patrino surprizite.

Dume Petro kuris por malfermi la domopordon.

Malfermite la pordon li estis surprizita vidinte la plorantan knabinon. Ŝi staris sur la domosojlo ankoraŭ ploranta.

- Bonan tagon, knabineto, kara –diris la patrino tenere.... Kiu vi estas?

-Mi mmi estas ...denove ŝi ekploris forte. Ŝia nazo fluis pro la ploro kaj okuloj ruĝiĝis. Ŝi levis la kapon serĉante okulojn de patrino de Petro kvazaŭ ŝi volus diri – Helpu min! Ŝi apenaŭ eldiris – Mi perdiĝis! - plorvoĉe ŝi klarigis.

Do, trankviliĝu kara! Kiel vi nomiĝas? – provis la patrino ekscii ŝian nomon.

- Jes, mi estas Jana. Mi estis kun mia avinjo. Ŝi eniris bazaron dum mi atendis ŝin ekstere.

- Ja, kio okazis poste.... nu

parolu, diris la patrino iomete maltrankvile.

- Poste mi vidis belan blankan hundeton ligita ĉe la trunko de tilio. Iu avo plukis foliojn de tilio. Poste li foriris, kaj min allogis montrofenestroj kun belaj grandaj pupoj. Jana faris paŭzon por viŝi la larmojn fluantaj sur vizaĝon kaj daŭrigis la rakonton -

- Poste mi vidis sur la vendotabloj surtabligitaj florpotojn, kaj mi iris flari ilin ĉar ili tre bonodoras. Kaj mi...mi ne scias, kiel mi trovis min el via strato. Mi vidis, ke la pordego estis malfermita kaj mi eniris. Ja, tio estas ĉio. Ĉu vi povas helpi min?

- Jes, kompreneble, diris la patrino aldonante - Ne ploru plu. Diru al mi kie vi loĝas. Ĉu vi scias en kiu kvartalo troviĝas via

loĝejo aŭ apud kiu konata konstruaĵo - demandis la patrino ankoraŭ maltrankvila.

- Jes, mi scias, mia loĝejo estas alta je ĉiuj fingroj oni povas nombrumi la etaĝojn! Jes mi memoras apude troviĝas skiterenoj -

senspire klarigis Jana. Unuafoje oni vidis rideton sur ŝia ploranta vizaĝo.

- Oh, bonege! Ni solvis la problemon. Tuj mi telefonu al la edzo, ke li iru al Kraljevica kvartalo por pridemandi homojn pri viaj gepatroj. Kaj via avinjo nomiĝas....- la patrino faris paŭzon ,....Marta -

laŭte diris Jana feliĉa etendiĝante la manojn al Petro.

- Tre bone Jana – diris Petro. Ne timu plu, mia patro trovos ilin kaj ni kune revenigos vin hejmen, Ĉu ne panjo? –diris Petro feliĉa pro la kaptita okazo neatendite gajni amikinson.

La patrino de Petro milde karesis ŝian nigran hararon. Petro kaj Jana

sidis komforte eltrinkante sukon kaj manĝante bongustajn kuketojn.

- Petro, filo mia, ĉu vi ne bedaŭras pro hodiaŭa perdita ekskurso - demandis la patrino ride sian filon.

-Ne, panjo, mi hodiaŭ gajnis belan amikinson.

Ni ekskursos alian tagon sed amikeco estas pli valora - diris Petro forte tenanta la manon de Jana . .

Fino de la 2 parto

Verkis Miriĉ Jadranka –Zajeĉar-Serbio

Aŭtuno

Aŭtuno

